



LA ORGANIZAJHO MAZINGIRA
P.O KESTO 51, BUNDA. TANZANIO



Retadreso: smbmramba@yahoo.com , Tel: +255 755 076596

Retpaghoj: www.kono.be/mazingira/eo
<http://www.verduloj.org/mazingira.htm>

14-an de Oktobro 2019

Estimataj subtenantoj.

Jen la raporto pri la agado de Mazingira inter Oktobro 2018 ghis Septembro 2019. Dum tio chi periodo pluvis iom ne sufiche bone en mia distrikto kaj tio malfaciligis la rikoltojn, nun la kostoj de manioko kaj dolchaj terpomoj estas tre altaj kaj same la prezoj de maizoj kaj sergumoj altighis, pro tio kelkaj familianoj povas nur manghi unu foje dum 24 horoj anstataŭ dufoje tage.

Malfelicha novajho okazis dum la periodo, temis pri la forpaso de nia kara amiko S-ro Snorre Benum en Marto 2019 pro trafika akcidento pro kamiono en Julio 2018 en la urbocentro de Oslo.

Mi povis vojaĝi al Britio dum Aprilo 2019, por partopreni al la 100a Brita Kongreso de Esperanto kiu okazis en Dovro inter la 12a ghis la 16a de Aprilo 2019 en tio kongreso ankaŭ cheestis Francoj Esperantistoj, Mi profitis la okazon renkonti Esperantistojn en Skipton, Wolverhampton, Portdown, Belfasto kaj Leeds-Bradford kaj mi prelegis al ili pri mia agado, ankaŭ mi vizitis la Brita Esperanto centro en Barlaston.

Mi kore dankas al chiuj samideanoj kiuj finance kontribuis por subteni mian vojaĝon al Britio, mi ne povas nomi chiujn tie chi char temas pro multnombraj de diversaj landoj, tamen mi estas devigatan danki al S-ron Malcolm Jones kiun plimulte zorgis kiel chef-organizinto por mia vojaĝo kaj programoj en Britio kaj Nord-Irlando.

Multan dankon al chiuj kiuj subtenis la projektojn de Mazingira dum tio chi periodo, inter ili estas: La franca asocio Solidareco Afriko-Azio de Boris Bouchez, Maryvonne kaj Bruno Robienau, Bart Demeyere, AVE kaj D-ro Manfred Westermayer, Ivo Durwael, Christiane Lamy ktp.

Mi ankoraŭ petas al vi chiuj daurigu vian subteno al Mazingira ankaŭ por la venonta periodo de la jaro 2020.

LA RAPORTO 2019

Puto projekto;

Dankon al la franca asocio Solidareco Afriko Azio de Boris Bouchez kiu daurigis la subtenon en 2019, ni konstrui 3 putojn. Mi daŭre petas Solidareco Afrika-Azio daurigi la subtenon por putoj en la periodo de la jaro 2020, char mi chiam ricevas petojn de diversaj vilaghaj lernejoj kaj malsanulejoj kiujn bezonas akvo-putojn.

Lernejo projekto;

La konstruado de instruista loghejo che Bigegu baz-lernejo daŭras bone en 2019 per la mono de la Sunflora projekto tamen ankoraŭ mankas iom da mono por fenestroj kaj pordoj kaj lignaj staboj por la tegmento, dank al tio projekto ni sukcesis mendi pordojn por la dua knabina gastigejo che Esperanto mez-lernejo kies konstruadon subtenis Cents-for-Help kaj kolekto de AVE kaj Manfred.

Mi tutkore dankas la franca asocio Solidareco Afrika-Azion de Boris Bouchez, kiu daurigis la subtenon al Mazingira por 2019, ni sukcesis konstrui 1 klaschambbron che Esperanto baz-lernejo en 2019.

Esperanto mez-lernejo baldau havos pli ol 750 lernantojn dank al la ekzistantajn internulejojn sed ghis nun la lernejo havas nur 8 klaschambrojn, ankoraŭ mankas pli da klaschambrojn, instruistajn loghejojn, bibliotekon, komputilejon kaj necesejon por ambau knaboj kaj knabinoj (**la necesejo estas la plej urghe bezonata ĉar la nunaj necesejoj kun entute 8 truoj kiujn subtenis geavoj de Bart Demeyere ne plu sufichas por servi al tiom da gelernantoj, do ni bezonas novan necesejon kiu enhavos ĉirkaŭ 16 truojn**).

Orfo-projekto:

Cxirkaŭ 466 infanoj ricevis helpon de Mazingira en 2019, inter ili ĉirkaŭ 435 infanoj ricevis helpon de Francio pere de la Franca asocio Solidareco Afrika-Azio kaj Maryvonne Robienau kaj 31 infanoj ricevis helpon de Belgio, Germanio de Esperanto Freiburg (kolekto de Manfred) kaj Nederlando, bedaŭrinde pro la trafika akcidento kiu kaŭzis la forpason de nia norvega amiko s-ro Snorre Benum mi ne ricevis ricevis helpon de Norvegio por la jaro 2019.

Sunfloro-projekto:

La sunflora projekto de Mazingira daŭris bone malgraŭ malmulte da rikoltoj dum 2019, ni kolektis sufiche multe da sunfloraj semojn kiujn ni premis kaj vendis sunfloran oleon en kiu ni ricevis ĉirkaŭ 21,000.000 TZS, parto de tio mono ni jam elspezis por subteni la konstruadon de instruista loghejo en Bigegu bazlernejo, parton ni elspezos por mendi 9 pordojn por knabina gastigejo ĉe Esperanto mezlernejo kaj alian parton ni elspezos por finkonstrui la klaschambrojn ĉe Bigegu bazlernejo en Bigegu vilagho. Bigegu bazlernejo nun havas ĉirkaŭ 650 gelernantojn kaj 11 instruistojn, ekzistas 7 klaschambrojn kaj 2 instruistajn loghejojn, pro tio ankoraŭ mankas pli da loghejojn por instruistojn kaj pliajn klaschambrojn. Ankaŭ ekzistas tie 1 klaschambrojn kiun bezonas iom da mono por renovigi ĝin, kompreneble mi elspezos iom da mono de sunflora projekto por renovigi tion klaschambrojn.

Mikrokreditoj projekto:

Daŭras la mikrokreditoj projekto, preskaŭ 300 grupanoj el 60 grupoj partoprenas al mikrokreditoj projekto malgraŭ kelkajn malfacilajhojn kiujn ili renkontas de kelkaj grupanoj kiujn renkontas kelkfoje malfacilajhojn pro repago de pruntmonon, tamen multaj el ili jam bone profitis de tio projekto ĉar ili jam sukcesis konstrui domojn, sendi ilin infanojn al lernejo, kolegio kaj kelkajn bone daŭrigas kuniliajn malgrandajn projektojn pro terkulturadoj bestobredadojn, kafejojn ktp.

Sano Projekto - Operacio por infanoj kun misformigo:

Multan dankon al S-ino Christiane Lamy kaj S-ro Malcolm Jones kiujn mon-donacis por subteni la operaciojn de infanoj kun misformitaj piedoj kaj svelajhoj dum 2019, ankoraŭ restas kelkajn infanojn kiujn bezonas tion helpon

Arbarigo:

Dank al Manfred kiu subtenis la rearbarigo-projekton por 2019, bone sukcesis semi arbojn sur la monto Tiring'ati, tamen ni ankoraŭ bezonas pli da mon-helpon por ebligi nin planti pli da arbojn por utiligi arbojn por pluvo, abel-bredado kaj frukt-arboj.

Radio projekto;

Radio Mazingira Fm bone funkcias nun post kelkaj monatoj de ĝhia malfunkcio ekde pasinta Decembro kiam forta shtormo kun ventego frapis la anteno-turon kiu falis sur elektran kablön kiu kaŭzis grandan fajron kiu bruligis la montaron kaj difektigis la elsendilon.

Feliche dum mia rond-vojagho al Britio mi petis helpon de britaj samideanoj kiuj kolektis inter ili la monon per kiun ili aĉetis brokantan elsendilon por mazingira fm, ĝhi tre bone funkcias, mi kore dankas al ĉiujn kiujn kontribuis por la elsendilo, inter ili estas: Maurice Fouche kaj J. Marie Cash en Francio, Piet G de Belgio, Malcolm Jones, Michael Wade kja multaj aliaj el Britio.

Fino

Mramba S. Nyamkinda